**N I A V O Ĉ O**
## Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz MARTO 1999

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ**
**Sanchez Dragó pardonpetas**
La kampanjo muntita post la bedaŭrinda TV2-programo de "Negro sobre blanco" en kiu asertis ke oni povas nek ami nek preĝi en Esperanto, donis pozitivan rezulton. La 7an de februaro, Fernando Sánchez Dragó, publike petis senkulpigon pro la ĝeno kaŭzita, kaj eĉ anoncis la eblecon prezenti programon dediĉitan al la Esperanta Literaturo. Li diris ke temis nur pri
ne ofend-intenca afero, nur ŝerceto inter amikoj kaj ke li pardonpetas ĉu
eble li ofendis la esperantistojn. Aldone, S-ro Mingote kiu estis intervjuita, diris ke lia avo estis esperantisto (li diris tion tre fiere, orgojle).
**Letero al la direktoro**. La revuo “Perfiles” organo de la ONCE kiu distribuiĝas tutmonde, publikigis leteron sendita de Lupe Sanz, okaze de mon-unuiĝo (euro), pri la temo de unu lingvo por Eŭropo, kompreneble ŝi proponas esperanto.

_ Desengáñate, Luisito, nuestro futuro está en un gran gobierno universal de minorías independentistas.
_ Tí. En esperanto.

La vinjeto, desegnita de Chummy Chúmez, aperis en Diario 16 (1999-02-15)

**MIGUEL FERNÁNDEZ AGADAS**
De nove Micjo partoprenos en la somera programo de la E-centro “Kvinpetalo”. Li gvidos la kurson pri “La hispana poezio” dum julio. La centro estas en Bouresse, apud Poitiers kaj havas trakvilan kaj agrablan e-etoson.

## HISPANA ESPERANTO KONGRESO
La Prezidanto de Hispanio, Moŝta Sinjoro José María Aznar akceptis la honoran prezidantecon de la "58-a Hispana Kongreso de Esperanto" kaj "9-a Eŭropa Esperanto-Forumo", kiuj okazos en Castellón (Hispanio) ekde la 17a ĝis la 21a de julio 1999.
En la TTT-paĝo //personal.redestb.es/a-casquero aperas informoj pri la 58-a Hispana Kongreso kaj pri la 9-a Eŭropa Esperanto-Forumo, kiuj okazos en Castellón inter la 17-a kaj la 21-a de julio.

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**
10-a Kongreso de Valencia Esperanto Federacio kaj Murcia. 17-18a aprilo. Lorca (Murcia)
51a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto Federacio. 8a-15a majo. Le Mans (Francia)
58-a Hispana Kongreso de Esperanto/9a Eŭropa Esperanto Forumo. Castellón. 17-21a de julio
84-a UK Berlino (Germanio). 31-a de julio ĝis 7-a de aŭgusto 1999.
Temo: *Tutmondiĝo: ŝancoj por paco?.*
http://www.geocities.com/SoHo/Studios/6120/esp.html
85-a UK Tel-aViv (Israelo)

**BUSKARAVANO AL BERLINO**

Grupo Esperanto de Valencia organizas vojaĝkaravanon al la Universala Kongreso de Esperanto en Berlino(Germanio), laŭ la jena programo:

**29-a julio**: Frumatene, eliro de la aŭtobuso de Valencia. Alveno en Besançon (Francio) fruvespere kaj tranoktado.

30-a julio.- Matenanĝo. Eliro el Besançon kaj alveno al Prago, tranokatdo.

31-a julio.- Matenmanĝo. Eliro de Prago kaj alveno en Berlinon posttagmeze.Tranoktado.

Restado en Berlino kun tranoktadoj kaj matenmangxoj, ĝis la 7-a de aŭgusto.

7-an; aŭgusto.- Tagmeze, eliro de Berlino, kaj vespere alveno en Torun (Pollando), kun partopreno en la 9-a Internacia Esperanto-Kongreso. Restado en Torun, kun tranoktado nur, kaj partopreno en la programo. Eventualaj tuttagaj ekskursoj :

1.-Al la belaj urboj Dancing, Sopot kaj Gdynia, cxe la Balta Maro, kaj al la impona kastelo de la templariaj kavaliroj en Malbork

2.- Al la ĉefurbo de Pollando (Varsovio).

10-a aŭgusto.- Eliro de Torun, kaj survoje al Prago ebla halto por viziti la plej faman dipatrinan pilgrimejon de la tuta orienta Eŭropo, Chenstochova. alvenon en Pragon. Tranokto.

11-a aŭgusto- Matenmanĝo, eliro kaj alvenon en Prago. Tranokto.

**12-a aŭgusto**.- Matenanĝo, eliro kaj nokte alveno en Besançcon.

13-a aŭgusto. Matenmanĝo kaj vojaĝo ĝis Valencio kie alvenos nokte.

La vojaĝo okazos per moderna kaj komforta aŭtobuso. La prezo kun loĝado en dulitaj ĉambroj, ĉiam en urbocentroj (ankaŭ en Berlino kun apartentoj 3/5 litoj), estos entute ĉirkaŭ 90.000 pesetoj, se aliĝas pli ol 23 homoj. Oni akceptos maksimumon de 35 vojaĝantoj. Post la 5-an de majo 5.000 pesetojn pli.

Por tiuj kiuj ne deziras vojaĝi per la aŭtobuso, oni disponigas ĉambrojn en Berlino por 4.200 pesetoj persono-nokto, en dulita ĉambro, en la urbocentro de Berlino, ĝis kiam jam ne restos pli da liberaj litoj en la hotelo. Tiuj kiuj deziros unulitan ĉambron devos pagi aldonan sumon.

Pli da informojn petu al Augusto Casquero. Telefonnumero 96 3401369, (21,00-22,00 horoj).

**HEF ANGULO**

**Lunde** kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: *admin@esperanto-es.org*

**Expolingua**: Post la kunveno de decembro, daŭras la laboro por prepari dokumentojn kaj materialon. **Madrida Esperato-Liceo donacis al HEF** 49.000 pesetojn por la aĉeto de televidilon kaj videon kiuj uzos en la budo de Expolingua kaj poste restos en la oficejo

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

**Prelego:** 15-an de marto "Esperanto Jubileo en Madrido-1987". Projekcio de video

12-an de aprilo "Iberaj pejzaĵoj: Andaluzio". Komentitaj lumbildoj

**Kursoj**: **Centro Cultural "Maestro Alonso"** (kvartalo Ventas).

Baza kurso, merkrede 18.30 ĝis 19.300. Profesoro Antonio Tur

Supera kurso, merkrede 19,30 ĝis 20,30. Instruas Carmen Suárez

**Centro de Día Puente de Toledo**. Mercedes Arteaga 18. Por triaaĝuloj lunde matene.